# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo:

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 20 €. Speciala: 15 €. Familia: 35 €.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**NOVEMBRO/DECEMBRO 2010** **Nro. 85 (5/10)**


Esperanto-Grupo
www.esperanto.net
Barrencalle Barrena, 7 - 1º - Teléfono 658 70 90 87 - 48005 BILBAO

Nacia Loterio № 00001

La posedanto de tiu ĉi kvitanco partoprenas, per du eŭroj kaj kvindek centonoj, la numeron **08.235,** kies lotado okazos en Madrido la 22-an de Decembro 2010.

GRUPO ESPERANTISTA
Barrencalle Barrena, 7-1.º
48005 - BILBAO

2,50 eŭroj (MON-DONACO: + 0,50 €)

Senvalora post 3 monatoj. Caduca a los tres meses. 3 hilabeteren ondoren, baliorik gabea.

## KRISTNASKA LOTERIO / LOTERÍA DE NAVIDAD.

Kristnasko alproksimiĝas kaj la kutimaj loteri-kvitancoj jam kuŝas ene de niaj tirkestoj, atendante ke vi aĉetu ilin.


Ĉiu kvitanco kostas 3,00 €, el kiuj oni ludas 2,50 €; la resto, t.e., 0,50 € estas mondonaco por la E-Grupo.

Ni atendas ĉies helpon por la disvendado!

Kaj ne forgesu ke la lasta tago por aĉeti ĝin estos la 18-a de decembro, dum la zamenhofa festkunveno.

## LOKE ...

## "FIESTA DE ZAMENHOF".



Como es habitual por estas fechas, también este año nos reuniremos para conmemorar el nacimiento del creador del Esperanto, un 15 de Diciembre de 1859.

La reunión será el **sábado 18 de Diciembre,** a las **19,30 h.** Habrá una breve charla sobre el Esperanto y, a continuación, continuaremos esa charla alrededor de una mesa, provista de aquello que aportemos, para comer, los que acudamos.

Como es habitual, el pan y las bebidas correrán por cuenta del Grupo.

Todos los socios, así como de sus familiares y amigos, serán bienvenidos.

## Ĉi-jare ne eblis organizi elementan kurson.

Pro manko de gelernantoj, ĉi-jare ne eblis organizi elementan kurson de Esperanto ĉe nia sidejo. Tamen, la gelernantoj de la pasinta lernojaro renkontiĝas ĉiuvendrede por praktiki la lingvon kun veteranaj esperantistoj. Ni atendas vin.

## Intervjuo en "Deia".

La pasintan 2-an de oktobro, la ĵurnalo "Deia" publikigis ampleksan tutpaĝan intervjuon al la sekretario de la Grupo, Jesús M. García Iturrioz, akompanata de la foto, kiu aperas ĉi-maldekstre.



Bedaŭrinde, la titolo, kiu tekstis "esperanto estas ege pli facila ol la eŭska", ne respegulis la longajn klarigojn, kiujn donis nia samideano pri la internacia lingvo kaj ĝia naskiĝo en nia provinco. Ĝi estis naiva kaj rutina respondo al demando de la ĵurnalisto: "Ĉu Esperanto estas facila lingvo? Ĉu pli facila ol la eŭska?".

Tamen, malgraŭ ke "Deia" ne estas la plej legata ĵurnalo en Bilbao, multaj homoj atentigis nin pri la apero de la artikolo.

## CUOTAS DEL AÑO 2010.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una cruz roja, es que no has pagado la cuota de socio del presente año 2010. Por ello, más que nunca, dadas las dificultades económicas por las que atraviesa el Grupo, a causa de la colocación de un ascensor en el inmueble, te rogamos que la hagas efectiva a la mayor brevedad posible.

Las cuotas, vigentes desde hace ya varios años, son:

| | |
|---|---|
| Cuota normal: | 20,00 euros anuales. |
| Cuota reducida: | 15,00 euros anuales. |
| Cuota familiar: | 35,00 euros anuales. |

## Esperanto, en la televidprogramo “Saber y ganar”.

La vendredon 19an de novembro, en la programo “*Saber y Ganar*” (“scii kaj gajni”) (lunde ĝis vendrede je la 15.30, pli malpli, en TVE 2) je la minuto 12'35” la demandisto demandis:

- “*La filmo Angoroj* (li prononcis *Angoroĥ) de la franca direktoro Atelier Mahé estis, en 1964, la unua filmo tute reĝisorita en kiu lingvo?*
- Unua konkursantino: *Ĉu en Bretona?*
- Dua konkursantino: *Ĉu en Okcitana?*
- Tria konkursanto: *Ĉu en Esperanto?*
- Demandisto: *Jes, en E-o; Angoroĥ, hispane Angustia. Kuriose... la E-o”*

La demandisto eraris la nomon Jacques-Louis (*Atelier* signifas *ateliero*-n kaj tradukis la filmon en singularo, sed mi tre ŝatis rigardi kaj aûdi la demandon.
Eblas rigardi la programon ĉe http://www.rtve.es/television/saber-y-ganar/
Pli da informoj pri la filmo ĉe http://eo.wikipedia.org/wiki/Angoroj

*(Jordi Lietor, 21/11/2010)*

# KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

## Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo.




Dum la Paskosemajnfino de vendredo la **22-a ĝis mardo la 26-a de aprilo 2011**, riĉa kultura kleriga kaj turista programo atendas vin en la ĉarma suna ĉemediteranea havenurbo Seto: temas pri la Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo kunorganizita de pluraj Esperanto-asocioj agantaj en franclingvio : Esperanto-France, SAT-Amikaro, esperantistaj Fervojistoj, Geinstruistoj, Katolikoj ...

Al la aranĝo invitas Langvedoka-Rusiljona Federacio aganta per LOKO, t.e., Loka Organiza Komitato. La renkontiĝo okazos en Le Lazaret, komforta feriejo en la urbo Seto ĉe Mediteraneo, kiu provizas multajn dormlokojn, surlokan manĝon, salonegon kaj kunvenejojn. De la jaro 1978 okazas finauguste en «Lazaret » la ISE.

Por vesperoj dancigaj au etosigaj prezentiĝos Jacques Yvart, JoMo kaj Solnishka, Teatro-Trupo de Tuluzo, FaMo, Kapriol', Kaj Tiel Plu. Dominique Gautier prezentos sian filmon pri la Esperanto-movado premiere.

Pliaj informoj kaj alighado je http://esperantosete2011.fr

*(Vito Markovo. 09/10/2010)*

**Aliaj kongresoj**.

| | |
|---|---|
| 14/21 jul. | 67-a Internacia Junulara Kongreso. Hiblivka (apud Kievo). Ukrainio. |
| 23/30 jul. | 96-a Universala Kongreso de Esperanto. Kopenhago. |
| 30 jul./06 aŭg. | 84-a SAT-Kongreso. Sarajevo. |
| 20/27 aŭg. | Itala Kongreso. Torino. |
| Jul. 2012. | 97-a Universala Kongreso. Hanojo (Vjetnamio) |

**H.E.F.**

## HISPANA KONGRESO 2011.

Mi informas vin, ke la venonta Hispana Kongreso okazos en El Escorial. Mi esperas, ke baldaŭ ni povos diskonigi pliajn detalojn pri la datoj, kongresejo, loĝado, programo... ktp.

*Pedro Hernández, Prezidanto de HEF. 28-09-2010.*

## Kandidatiĝo Taragono 2016 ankaŭ en esperanto.

La retejo de Taragono, prezentas sian kandidatiĝon al eŭropa ĉefurbo pri kulturo en diversaj lingvoj inter kiuj la internacia estas.

http://www.tarragona2016.org/presentacio/prezento

*(Farri. 28/09/2010)*

## Laboroferto por esperantistoj.

Oni serĉas esperantiston kiel turisma informisto por la semajnfinoj en vilaĝo Subirats (provinco Barcelona) kaj por gvidi en la muzeo. Oni pagas 300€ monate kaj parto de la kostoj de la enirbiletoj. Oni valoros konoj pri literaturo, historio kaj ĝenerala kono (krome esperanto, kompreneble). La retpoŝto estas info@turismesubirats.com

*(Jesús García Cano. 18/10/2010)*

## Nova libro pri esperanto hispanlingve.

Kiel anoncite jam estas eldonita la unua libro de la Biblioteca de la Escuela Argentina de Esperanto (hispanlingve):

1.- Sartor-Battig, *Esperanto, una cura para las heridas de Babel.*
2.- Jorge Hess. ¿Sabe Ud. Esperanto?
3.- Diccionario Esperanto-Español. Español Esperanto.
4.- A. López Luna. Zamenhof, iniciador del Esperanto.
......

kies celo estas doni al AEL kaj argentina E-Movado taŭgajn manlibrojn por instrui kaj disvastigi la internacian lingvon. Novaj libroj aŭ reeldonoj estas bezonataj ĉefe por la anoncita E-katedro en la Universitato de La Plata, kaj ĉie kie ni organizos novajn E-kursojn, kunvenojn, kongresojn ktp.

La profitoj eltirontaj el la vendado de la libroj estos tute deponataj en la Bankkonto de AEL-LEA. Do des pli da libroj estas vendotaj pli da mono estos disponebla por la agado de AEL….ĉefe por la kandidatiĝo por estonta UKo.

La eldonisto uzas la novan sistemon DEAUNO.COM kaj oni aĉetos la librojn rekte pere de interreto ĉe:

http://www.elaleph.com/libro/Esperanto-Una-cura-para-las-heridas-de-Babel-de-R-Sartor-A-Battig/247047.

Roberto Sartor, Kunaŭtoreditoro. rosartoro@gmail.com. jarlibro paĝo 101. SAT N°35141.

Indekso:

Prólogo ............................................................................... 7

PRIMERA PARTE
ESPERANTO ¿UNA CURA PARA LAS HERIDAS DE BABEL? 11
Introducción ........................................................................ 13
Objetivo de esta monografía .................................................. 15
1 Características básicas del esperanto ................................. 17
2 Orígenes del esperanto ....................................................... 21
3 El Esperanto y los totalitarismos ...................................... 29
4 Esperanto y marxismo ....................................................... 35
5 Esperanto y otros regímenes políticos del mundo ........... 37
6 El Esperanto en argentina ................................................. 39
7 Esperanto y cristianismo .................................................... 45
8 El Esperanto y los organismos internacionales ................ 51
9 Actualidad del Esperanto en el mundo ............................. 57
10 ¿Esperanto o inglés? ......................................................... 61
Conclusión ............................................................................ 67
Fuentes – Bibliografía ............................................................ 73
SEGUNDA PARTE. DOCUMENTOS .................................... 75
1 Breve cronología de la vida de L.L. Zamenhof ................ 77
2 Declaración sobre el Esperantismo .................................. 85
3 Esencia y futuro de la idea de una lengua internacional . 89
4 Manifiesto del Movimiento Esperantista a favor de la lengua internacional Esperanto ................ 143

*(Darío Rodríguez. 21/10/2010)*

## NOVAĴOJ.

- Ĵus aperis nova lernolibro por hispanlingvanoj "El esperanto por el método directo", de Stano Marĉek, tradukita de Augusto Casquero kaj reviziita de Jesús M. García Iturrioz; komplete ilustrita 22-leciona kurso por hispanlingvanoj, kun vortareto ambaŭdirekta.

- La estraro decidis krei retpaĝon por MEL ene de la paĝaro de HEF. Jam laboras pri ĝi Miguel Ángel Sancho kaj Toño del Barrio.

- Pli ol 300 homoj el 33 (jes, tridektri) landoj partoprenis la ĉijaran italan kongreson. Enviindaj nombroj, ĉu ne? Eblaj kaŭzoj por tiu sukceso: la fakto ke U.K. okazis ekster Eŭropo; la forta kaj lerta propagando farita de i.a. amiko Amerio; la enprogramigo de multaj elstaruloj, tiom en la spektakla flanko kiom en la kleriga. Kaj jam oni povas aliĝi al la sekva-jara itala kongreso, okazonta 20-26 aŭg 2011 en Torino.

- La sabaton 2-an de oktobro Pedro Hernández komencigis kurson de Esperanto kun 8 novaj lernantoj, en la ejo de HEF. La kurso okazas ĉiusabate inter la 11.00 kaj la 13.00, do, ne estos tiom komplike (sed certe interese) organizi ian postan e-kafumadon por interkonatiĝi kaj videbligi al la lernantoj kiel funkcias nia linkvo.

*("Nia Voĉo. Organo de Madrida E-Liceo. Oktobro 2010)*

## TRA LA MONDO ...

# Esperanto en CNN.

La programo 'Connecting the World' (Konektante la Mondon) kun prezentistino Becky Anderson en la televida kanalo CNN Internacia tra la lasta semajno inkluzivis kvin-tagan prezentadon pri lingvaj demandoj, precipe la risko de lingvo-morto. Ĉiu peco daŭras ĉ. 10 minutojn ene de la horlonga programo.

Hieraŭ nokte Becky anoncis ke en la lasta vespero (do ekde 10ptm CET, vendrede sept 17) oni esploros kreitajn lingvojn - kun cito de du ekzemploj en la sekva ordo - Klingon (el Star Trek) kaj Esperanto (prononcita angle). Ni devas atendi ke la parto pri Esperanto estos konciza kaj ne nepre pozitiva. Povus temi pri intervjueto (son-mordo) de esperantisto. Gravas tamen, ĉar CNN atingas ĉ. 200 milionojn da hejmoj kaj hotelĉambroj en 212 landoj ĉirkaŭ la mondo. Se vi povos, rigardu!

*Stefan MacGill, Prezidanto, ILEI (17-09-2010)*

Pri la sama afero:

Mi rapide registris la sonon el mia videokaseda registraĵo de la televidelsendo (CNN, Connecting the World, Languages) en kiu Arika Okrent estis intervjuata. La filmon (TV-elsendo registrita) transformi al reta versio nun mi ne povas, sed foje mi faros.

Intertempe, jen la angla originala sonregistrajho de la koncerna ero el la elsendo, Stefan (MacGill), bv. englui vian esperantan tekston sendita al la komitata listo (la tradukaĵon) kiel komenton sub la sonregistraĵon (fakte, la elsendo estas iom pli longa, sed ankaŭ via resumo taŭgus, laŭ mi)

http://www.ipernity.com/doc/113837/9112002/in/album/142463

*Stefano Keller (27-9-2010).*

# Brulis Bona Espero.

En la dissendolisto de la italaj esperantistoj ĵus aperis bedaŭrinda sciigo. Granda brulego detruis 90% de la teritorio de Bona Espero: per ega penado oni sukcesis savi la konstruaĵojn sed grandaj estas la damaĝoj: bruliĝis elektrodratoj kaj tuboj, la lago (cxefa fonto de akvo) estas plena je cindroj.

La brulego estiĝis nokte kaj tio igis des pli malfacilaj la operaciojn por estingi la brulegon: la bestoj - aparte la serpentoj - fuĝis direkten al tiuj, kiuj klopodis haltigi la fajrojn.

Pri Bona Espero: http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero

*(Carlo Sarandrea. 03/10/2010)*

# Eŭropa subvencio.

Itala Esperanto-Federacio ricevis subvencion de la Eŭropaj Instancoj(Tutviva lernoprogramo - Grundtvig) de proksimume 35.000 eŭroj por aranĝi seminarion pri eŭropa identeco dum la venontjara itala kongreso de Esperanto.

Dankon al pluraj italaj laborintoj por tio kaj al Halina Kumar, kiu daŭreinsistas pri tiu temo.

*(Renato Corsetti. 06/11/2010)*

## Jogurtaj etikedoj en Esperanto.







## Televida reklamo en Esperanto.

Varbagentejo produktis varbofilmon, kie la aktoroj parolas en Esperanto (kvankam en 100% korekte). La konversacion oni subtekstigis, sed la subtekstoj ne vere diras tion, kion diras la aktoroj... Ekzistas pluraj samspecaj filmoj (12), ĉiam la sama konversacio, sed diversaj tradukoj.

Fine la informo: unu vino, sed miloj da babiloj! - La varbofilmo aludas pri sento de kuneco, familia kunvivado, amikeco.

Ĉe la tradukado al Esperanto helpis Silvia Rottenberg, prezidantino de Argentina Esperanto-Ligo.

La filmoj troviĝas cxe: http://www.youtube.com/user/UnVinoMilCharlas

*(Miguel Gutiérrez adúriz. 11/11/2010)*

## Biciklista Esperanto Movado Internacia en la reto.

(http://bemi.free.fr/eo.html)

Ekde la vintro de 1999 funkcias diskutlisto por BEMI-anoj. Antaŭnelonge, vi trovis ĝin en la TTT-ejo www.egroups.com, sed Yahoo transprenis ĝin, kaj la nuna adreso estas: http://groups.yahoo.com/group/BEMI

Vi povas aliĝi sen iri al la TTT-ejo per sendo de malplena mesaĝo al: BEMI-subscribe@yahoogroups.com . La diskutlisto celas al BEMI-anoj, kiuj deziras babili pri biciklado, kaj precipe pri okazontaj kaj pasintaj karavanoj. Cetere, ni deziras prilabori malnovan grandiozan projekton. Kune ni povas fari pli ol unuopuloj povas fari.

*(Luis Salag, 21/11/2010)*

## Pri la teruraj okazintaĵoj en Okcidenta Saharo.

Ekde hieraŭ nokte la paĝo de Sahara Esperanto-Ligo liveras informojn pri la teruraj okazintaĵoj vivitaj nuntempe en Ajuno kaj en aliaj urboj. La informoj aktualiĝas de tempo al tempo. Ni invitas vin viziti la paĝon. www.sahara-esperanto.ueuo.com

*("Esperanto en Córdoba". 08/11/2010)*

## Argentina televidreklamo.

Mi ĵus malkovris ke vinaj entreprenoj le Argentinujo eldonis televidreklamon en Esperanto. Estas 12 reklamoj kun la sama dialogo en Esperanto sed ili subtekstigis malsame kaj intence erare ĉiun reklamon. Spektu ili ĉe: http://www.youtube.com/user/UnVinoMilCharlas

*(Karlo. 11/11/2010)*

## Planligvo: la filmo.

Antaŭ kelkaj monatoj Verda Filmejo informis, ke grupo de studentoj de Kolumbia universitato kreis mallongan 15-minutan ludfilmon pri planlingvoj "Conlang: the movie". Temas fakte pri lingvokonstruistoj kaj amo. Esperanto rolas tie ne la lastan rolon.

La filmo jam furoris en kelkaj filmaj festivaloj kaj ricevis premion. Konata esperantisto, fondinto de Esperanto-vikipedio kaj aktivisto Chuck Smith aktive kunlaboris kun la kreantoj. Kiel rezulto de tiu kunlaboro en oficiala eldono de DVD-disko kun la filmo aperos subtekstoj en Esperanto.

Por financi la eldonon de limigita kvanto de DVD-diskoj la kreantoj de tiu nekomerca projekto okazigis monkolektadon. Se ĝi sukcesos, la subtenintoj ricevos DVD-diskon per poŝto.

Ĉiu povas subteni interesan projekton kaj vere spektindan filmon. Kaj mi invitas vin fari tion, ĉar la filmo vere estas spektinda. Restas nur 20 tagoj.

Oficiala paĝo de la projekto (en la angla):
http://www.kickstarter.com/projects/462792628/conlang-special-limited-edition-dvd

Tie ekde hodiaŭa tago estas filma fragmento kun subtekstoj en Esperanto. Priskribo en Esperanto kaj kiel mendi DVD-diskon:
http://filmoj.net/planlingvo-la-filmo

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 15/11/2010)*

LA E-GRUPO DE BILBAO DEZIRAS,
AL VI ĈIUJ,
KIEL EBLE PLEJ DA GAJECO DUM LA VENONTAJ JARFINAJ FESTOTAGOJ
KAJ
FRUKTODONAN JARON 2011